

Albert Theodor Gellerstedt,

## En Baĥarah'

*tradukita de N. N. 53*

Desegnante multthore ni sidis  
en sunbril' en monta ruin'.  
Jam ne ŝercis ni, aŭ ridis,  
sed sopiris al mangĥ' kaj vin'.

En la urb' en la valo ni trovis,  
kiel neston de birdogent',  
gastejon en florgardeno  
kun malnova stil' kaj silent'.

Nia tablo staris en ombro  
en ŝirm' je suna varmaj';  
da glasoj jen plena nombro,  
kaj bonodoranta rostaĵ'.

Malnovtempon ni vidis revante,  
ĉar ne estis moderna la ŝajn' -  
malaltpreze ja ĉio, kaj grandkvante,  
sed ne konsideroj pri gajn'.

Ekbruligis la pipojn ni feliĉaj,  
kaj leviĝis la fum' al plafon'  
konsistanta el branĉoj foliriĉaj  
en volbeforma malpeza kron'.

...

Sentante viklecon kaj ĝojon  
pli ol estis kutime al ni,  
nur malfrue ni iris la vojon  
por ĉiam for el dom' tiu ĉi.

La gemastra flin' ĉe la pordo,  
kun bela ruĝec' sur vizaĝ',  
donis rozojn en ĉarma ordo,  
kaj bondezirojn por nia vojaĝ'.

*Traduko de la Sveda poemo "I Bacharach" de ALBERT THEODOR GELLERSTEDT (\*1836-10-06 – †1914-04-07) en Esperanton de N. N. 53.*

*MR-480-0 / Arg-816-1637 (2013-02-04 10:42:54)*

*Esperantigo verkita de nekonatulo. Vidu ankaŭ: <http://www.literaturo.dk/baharah.htm>.*